# JEN

## BULTENO

**n-ro 2**


**1972**



kvaronjara esprimilo

de la junularo esperantista de nord-ameriko

# >Vort-trezoro



Tiu ĉi rubriko aperas por diskuti lingvajn problemojn aŭ situaciojn kaj por aperigi reagojn de la legantaro al eblaj solvoj de tiuj problemoj. Via partopreno estas petata.

Ĉi-foje ni deziras proponi du vortojn kij esperеble plisimpligos komunikadon pri direktoj. Unu estas "lifa," ebla anstataŭaĵo por "maldekstra". Pro tio ke direktindikojn oni kelkfoje devas doni per malfacile komprenebla perilo (ekz, rapida ekkrio, malbone funkcianta aviadil-radio), kaj pro tio ke la diferenco povas esti vivosava, kelkaj opinias ke la eta "mal-" ne sufiĉe apartigas la du vortojn "dekstra" kaj "maldekstra". Do la la sugestitaj vortoj estas "dekstra" kaj "lifa".

Ankaŭ interesa estas la kazo de "oriento" aŭ "easto". Estas malpraktike ke la komencliteroj de du kompasdirektoj estas samaj; imagu kiel aspektus kompaso en Esperanto! Oni sugestas ke anstataŭ ol "oriento" kiel direktovorto oni uzu "easto". La vorto "oriento" tiel uziĝus por indiki la regionon de la mondo kiu inkluzivas Ĉinujo, Japanujo, ktp.

(Rekompense, oni eble enkonduki la vorton "niŝo" el la japana. por indiki la "okcidentan" parton de la mondo.)

Reagojn???

5¢ 5¢

LKK: Bonvole sendu al mi la oficialan kongres-afiŝon kontraŭ 55¢. Mi ŝparas 5¢ per tiu ĉi kupono.

nomo: ____________

adreso: ____________

urbo, ŝtato: ____________

5¢ 5¢

Por ricevi la belan kongres-afiŝon, kun vidaĵo de Portland, sendu la apudan kuponon kun 55¢ al:

Mrs. Anne Whitteker<br>
20 S.W. Mitchell<br>
Portland, Oregon.

Uzante la kuponon, vi ŝparos 5¢ de la norma prezo.

---

La redakcio de JEN-Bulteno bonvenigas fraŭlinon Debi Kottler kiel kunlaborantino en la arta fako.

## Ĉi-monate...

La vagabonda vojaĝanto sur la kovrilpaĝo indikas al vi ke ĉi tiu numero plejparte pritraktas vojaĝadon. Vi eĉ notos sur la jako de la vaganto la stelon de espero, kaj sur lia turnistro ŝildon de unu el la UKoj.

Do, dum la vagabondo travagas iun landon, eble celante la portlandan kongreson, tralegu tiun ĉi revuon. Bonvojaĝon kaj bonlegadon!

## Kelkaj impresoj pri la alia Ĉinujo

de Scott Aleshire

Dum la pasintaj semajnoj oni aŭdis multon pri Ĉinujo pro la vizito de Prezidanto Nixon kaj pro la iom subitaj klopodoj en Pekino kaj Vaŝingtono renormigi la rilatojn inter ambaŭ landoj post longa izoleco. Dum tiu tempo en Usono oni ja sciis malmulton pri aferoj ĉinaj; tamen, unu insula provinco, Tajvano, restis alirebla por usonanoj, pro tio ke la Naciĉeca Registaro, kies ĉefulo estas Ĉang Kaj-Ŝek, nia mondmilita aliancano, kiu translokiĝis tien kiam la Ruĝa Armeo ekokupis la ĉefteron en 1949.

Ne ĉiam ĉina estis Tajvano. La foja pirata fortikejo malrapide, kaj eĉ hodiaŭ ne plene, ĉiniĝis. Restas el la tajvana montaro nun grupetoj da indigenoj -- tiuj homoj kiuj, kiel la nordamerikaj indianoj, enloĝis la landon ĝis kiam ĝin subigis pli potencaj kaj pli multnombraj najbarlandanoj. El la ĉinoj kiuj nun enloĝas Tajvano, la plimulto estas tielnomataj tajvananoj, kies raso kaj lingvo pli similas al tiuj de ilia hejmlando, la provinco Fukien, kiu alfrontas Tajvanon ĉe la okcidenta flanko de la Tajvana Markolo. Troviĝas krome parolantoj de dialektoj "hakaj," ankaŭ ĉefterdevenaj. Ambaŭ popoloj estas sudĉinaj.

Krom tiuj popoloj estas iuj japanoj, restuloj el la jarkvindeko de japana rego en Tajvano. La finon de la japana rego en 1945 sekvis la influo de la novaj regantoj, la kontraŭkomunismaj rifuĝintoj el la ĉeftero, precipe el la nordo. Regas ankaŭ, kompreneble, iom da lingva konfuzo en tiu eta insulo.

Dum kvar monatoj (oktobro ĝis januaro, 1969-70) mi loĝis kaj studis en Tajpejo, la ĉefurbo de Tajvano. Mi estis studinta jam antaŭ aliro la ĉinan lingvon (tiu de Pekino): ĝi estas necesa ilo por vivi inter la ĉinoj, ĉar okcidentanoj kiuj ne scipovas la ĉinan limigas sin al kontakto kun malmultaj angligitaj ĉinoj kaj kun kunokcidentanoj, precipe usonaj soldatoj kaj ties familianoj, kelkaj usonaj instruistoj, kaj kelkaj nordamerikaj, eŭropaj, kaj hongkongaj studentoj. Eĉ scipovante la oficialan pekinan dialekton, mi povis sperti nur unu nivelon de la socio. Kiel la regantoj, mi ne komprenis la lingvon de la plimulto.

Mi loĝis dum du monatoj ĉe ĉina familio kiu nomiĝas Ho. La familio inkluzivas geedzojn, filinon 17-jaran, kaj hundinon. La edzo estis bankvicprezidanto kaj fanatikulo pri kartludo (briĝo) kaj historio. S-ino Ho mastrumadis kaj dimance instruis infanojn ĉe baptista preĝejo. La filino, kies nomo signifas "racionserĉa," estis tiam liceanino.

La familio Ho estis netipa pro la grado de sia okcidentiĝo, tamen ne bone parolis la anglan. S-ro Ho estas Sen-si-ulo, do norddevena, kaj sia edzino estas Ŝanhaj-ulino. La filino naskiĝis en Tajvano post la gepatra translokiĝo de la ĉeftero.

Post dumonata loĝado ĉe la familio Ho, mi ekloĝis en la Internacia Domo-Tajpejo, kie miaj tri samĉambranoj estis ĉiuj tajvananoj (tamen ankaŭ parolantoj de la oficiala dialekto), ĉiuj viroj, kaj ĉiuj studentoj (pri inĝenierado kaj komerco) ĉe la Tajvana Nacia Universitato, verŝajne la plej granda kaj plej bona altnivea instruejo en la lando. Post la diplomiĝo ili ĉiuj soldatiĝis.

La translokiĝo al Tajvano estas, laŭ multaj nordulo tie, dumtempa afero nur. Ili opiniis ke oni iam regajnos la ĉefteron. Multaj enloĝantoj interesiĝas pri fremdaj landoj, sed tre malmultaj konas la eksteran mondon krom per televido, libroj, kaj ĵurnaloj. Nur diplomatitaj universitatanoj rajtas vojaĝi eksterlanden. Tiuj kiuj eliras devas unue sukcesi ĉe malfacila ekzameno en la angla lingvo. Se neniu en la familio estas juĝita politike danĝera, oni rajtas vojaĝi. La plimulto vojaĝas al Usono por daŭrigi la studojn.

Oni trovas diversajn pensmanierojn pri okcidentanoj. Ekzistas kelkaj oldulo kiuj malvolonte travivis unue la japanan okupadon, kaj travivas nun, same malvolonte, tiun de la nordulo kaj usonanoj. Kelkaj el ili ĵetas ŝtonojn kontraŭ okcidentanoj, kriante "Fremdulaĉo!" aŭ "Usonano!" Eĉ eŭropanoj tiel viktimiĝas. Aliaj ĉinoj ne kontraŭstaras la ĉeeston de usona militpotenco en Tajvano; certe la registaro kaj la plejmulto de la nordulo ĝojas pri la protekto de la helpgvardio kontraŭ ebla ekokupo el trans la markolo. Sed por kelkaj la ekstera mondo ne ekzistas. Unufoje, veturante en aŭtobuso al Tajpejo de antaŭurbo, knabineto tajvana ekmiris vidante min; ŝia patrino klarigis al mi (ŝi konis iom la pekinan) ke sia familio loĝas en la montoj, kaj tiam unue sia infano iras al la urbego kaj unue vidas fremdulon. Mi do estis por ŝi la unua blankulo-- alta, havanta longan nazon kaj strangan hararon kaj odoron.

Tajvano estas vere bela insulo. La signifo de la nomo (T'aj-ŭan) similas al "terasa kubo," kaj la portugaloj nomis ĝin "Formosa," tio estas, "bela". Sur Jang-ming Ŝan ("Monto de Sola Brilo") fluas malvarmaj rivéretoj sur belaj, terase aranĝitaj montĝardenoj. Ne nur natura beleco troviĝas tie, sed ankaŭ la beleco de la ĉina kulturo: ekzistas kelkaj imponegaj muzeoj. Ankaŭ en Tajvano troviĝas la ĉeflokalo de la "Akademia Sinica" (en la ĉina, la "centra studejo"), la plej altnivela asocio de ĉinaj klerulo. Kiel la homoj kaj muzeoj, ĝi translokiĝis al Tajvano post la elpuŝo de la Naciistoj.



## Salato de Kristnaska Antaŭvespero

(Tiu ĉi meksika recepto prezentiĝas kiel konsoldonaco al tiuj kiuj ne povos vojaĝi ĉi-somere.)

### Ingrediencoj

- kuiritaj betoj tavoltranĉitaj aŭ kubtranĉitaj
- oranĝoj senŝeligitaj, diserigitaj
- ruĝoŝelaj pomoj senkorigitaj, pecigitaj
- bananoj senŝeligitaj, pecetitaj
- ananaso pecigita (freŝa au enladigita)
- "jicama" (elp. hikama) kruda, senŝeligita, pecigita. "Jicama" estas meksika manĝebla radiko. Dolĉa, blanka, simila je, sed pli bongusta ol napo.)
- arakidoj haketitaj
- mielo
- citronsuko aŭ limedosuko
- laktuko
- granatsemoj aŭ pecetigitaj ĉerizoj

### Metodo

Tiu ĉi salato permesas al la faranto projekti belan aranĝon de la ingrediencoj. Oni devas pecigi la fruktojn kaj legomojn laŭ tavoltranĉaĵoj, kubtranĉaĵoj, kojntranĉaĵoj, ktp, kaj aranĝi la pecetojn arte sur la laktukfolioj. Samcentraj cirkloj aŭ ovoformoj estas tradiciaj. Post la aranĝado de la frukto kaj legompecoj, kaj tuj antaŭ ol porti la salaton al la tablo, surverŝu miksaĵon de mielo kaj limedo- aŭ citrono-suko, kaj superŝutetu la arakidojn kaj la granatosemojn.

Decidu pri proporcioj laŭ via bontrovo kaj eksperimentemo. Tiu ĉi salato ĉiam estas refreŝiga kaj bela. La (por usonanoj) malfamiliara kombinaĵo de ingrediencoj estas bongusta kaj interesopika. Kaj kiel atendi Kristnaskon? Preparu ĝin morgaŭ!

## Karnavalo da Miksaĵoj

de Daniel Mason

Sur la lazura Kariba Maro estas multaj verdaj insuloj. Multaj kulturoj, lingvoj, kaj rasoj ekzistas tie. Dum tri jarcentoj, la mararmeoj hispana, franca, angla, kaj nederlanda luktis, kaj el tiuj marluktoj venis miksitaj kulturoj tre diversaj kaj tre interesaj. Eble la plej diversa el tiuj insulaj kulturoj estas la nova nacio Trinidado kaj Tobago.

Kelkaj nacioj estas novaj nacioj. Malgrandaj sed fieraj, ili estis naskitaj antaŭ kelkaj jaroj el la mortanta angla imperio. Nuntempe Ĵamajko, Barbado, kaj Trinidado estas tri sendependaj, etaj nacioj. Kompreneble, tiuj ĉi insulnacioj estas la plej malgrandaj el la nacioj de la okcidenta duonsfero. Ekzemple, Barbados estas longa nur ĝis dudek unu mejloj. Pli granda estas la insulo Trinidado, kiu estas pli ol cent mejloj kaj enhavas pli ol 750,000 loĝantoj. Trinidado kune kun la insuleto Tobago estas unu nacio.

Port-of-Spain (Porto Hispana) estas kaj la plej granda urbo kaj la ĉefurbo de Trinidado. Al tiu ĉi haveno venas ŝipoj el ĉiuj mondpartoj, kaj sur la bruaj, komercokupitaj stratoj oni povas vidi homojn tiel diversajn kiel nia tuta mondo. Vizaĝoj nigraj, brunaj, flavaj, kaj blankaj pasas kaj repasas surstrate. La popolo de Trinidado kreskas el radikoj afrikaj, aziaj, kaj eŭropeaj. La du plej grandaj popolgrupoj estas la negroj kaj la hindoj. Aliaj grupoj estas portugaloj, ĉinoj, angloj, kaj araboj.

Religie Trinidado ankaŭ estas tre diversa. Tie troviĝas kristanoj, kaj katolikoj kaj protestantoj, hinduoj, islamanoj, kaj judoj. Do, tre ofte laŭ la strato oni povas vidi presbiterian preĝejon proksima al islama moskeo, aŭ katolikan katedralon apud hindua templo. Ĉu tio ne estas sufiĉe diversa? Nu, en la montetoj malantaŭ Porto Hispana troviĝas aliaj religioj. Tie, la antikvaj dioj el Afriko estas memorigitaj per la sango de kokoj kaj kaproj. Per emociplenaj dancoj kaj kantoj la sango estas oferita al Ŝango, Vudun, aŭ Dumbala. Kandeloj bruletas antaŭ la bildoj de katolikaj sanktuloj kiuj estas samtempe afrikaj dioj.

Alia paradokso atendas la angloparolanton. Kvankam la angla lingvo estas oficiala kaj la angloparolanto povas legi la afiŝojn, reklamojn, kaj ĵurnalojn, li tute ne povas kompreni la stratparoladon de Trinidado. La parolata lingvo de Trinidado ne estas la angla, oficiala aŭ ne! Sed kompreneble, eblas ke la trinidadanoj kredas ke la usonanoj, angloj, kanadanoj aŭ aŭstralianoj ne povas paroli angle! Mi ne estas certa; mi nur scias ke mi tute ne povis kompreni la surstratan babiladon.

Trinidado estas fama pro tri aferoj: la naskiĝloko de la ŝtalmuziko, la kalipso-muziko (improvizita popolkanto) kaj la karnavalo. Mi bedaŭras ke mi ne povis vidi la karnavalon. Ĉiu printempo dum kelkaj tagoj ekcititaj popolamasoj, paradoj, fantaziaj kostumoj, muziko, kaj dancantoj plenigas la stratojn de Porto Hispana. Certe tiu afero devus esti karnavalo da miksaĵoj.

## Esperantista Leterkesto

La jenajn gejunulojn deziras korespondi kun junaj geesperantistoj en Usono. Ĉu al vi ankoraŭ mankas eksterlanda Korespondamiko? Jen la solvo de la problemo!

Tri junaj hungaroj kiuj deziras korespondi kun usonanoj 16-17 jaraj.

Rósza, István
Budapest
VII kerulet
Izabella u. 1
Magyarország -- Hungarujo

Gyöngosi, András
Budapest
VII kr.
Rózsák tere 1
3. em 7
Magyarország -- Hungarujo

Bordás, László
Budapest
VII kr.
Rózsák tere 1
1 em 22a
Magarország -- Hungarujo

F-ino Sandra da Rocha Monteiro
Rua do Resnede 99, apto 802
ZC-06-Rio de Janeiro
20,000, Guanabara
Brazilo

Deziras interŝanĝi aŭ ricevi periodaĵojn (devas esti senkoste).

## Evitu perditajn pakaĵojn

Ĝenerale ni ne rekomendas privatan firmaon en JEN-Bulteno, sed la servo de International Luggage Registry (Internacia Pakaj-registro) ŝajnas tiel uzebla al vojaĝantoj ke ni decidis prezenti ĝin tie ĉi.

Por eviti la eblecon de perdo de pakaĵoj, la abonanto de la servo skribas sur registro sian nomon, adreson, kaj telefonnumeron. La informon oni sendas al komputero, kie ĝi iĝas daŭra registro. La abonanto ricevas individuan registronumeron kaj specialajn ŝildojn kiuj surhavas la registronumeron, la komencliterojn de la nomo de la persono, kaj centran telefonnumeron al kiu oni povas voki de ie ajn por loka prezo, por raporti trovadon de pakaĵo. Tiujn ŝildojn oni fiksas sur siaj pakaĵoj.

Okaze de perdo aŭ ŝtelo, la vojaĝanto alvokas la centran numeron por informi, kaj doni la registronumeron. Se alia persono informas pri trovado de la pakaĵo, la komputero indikas tion, kaj la kompanio sendas ĝin al la persono kiu proprietas ĝin.

Abonilo, kiu validas por unu jaro, estas haveble de aeroliniaj oficejoj, vojaĝaĝentoj, Montgomery Ward-aj butikoj, Greyhound Autobus-oficejoj, kaj perpoŝte de ILR, P.O. Box 4300, Reno, Nevada (Usono).

## Deziras korespondamikojn . . .

S-ro Istvan Szalai
Szeged-Rókus-stacio
Szeged, Hungarujo
24-jara, deziras korespondi kun gejunuloj. Interesoj: poŝtmarkoj, bildkartoj, bildoj de filmaktorinoj, gazetoj, ilustritaj broŝuroj.

Hiyaoka Hiroko
Nagaoka-cho tomooka note-28
Syokuin zyutaku-405, Japanujo.
Japana virino kiu estas oficistino kaj deziras korespondi kun laboranta virino pri pensmaniero de virinoj en Usono.

Kazue Itou
Kioto Higashiyama-ku
Yamashina Nishinoyama
Nakatorii-cho 136-6
Japanujo
Edziniĝita virino, naskiĝis en 1939. Diplomita en angla literaturo. Ĝuas muzikon kaj romanojn. Deziras korespondi pri virina liberigo.

Tachiki Sadaaki
Higasiyama-ku
Honmachi 10-chome, 140
Kioto 605
Japanujo
27-jara oficisto, interesiĝas pri politiko, ekonomio.

Renate Lampe
Salzwedel 365
Mittelstrasse 9
Germana Demokratia Respubliko
Lernantino, 17 jar-aĝa, interesiĝas pri Usono, niaj moroj, manĝkutimoj, muziko kaj danco, pm. kaj bk.

Maria de Fátima Alves
Rua Expedicionário Jose
Varela 42
Rocas, Natal, R. N.
Brazilo
16-jara fraŭlino.

Maria Gorete Matias
Rua Misericordia 722c
Natal, R. N.
Brazilo
16-jara fraŭlino.

## Somera Studado Eksterlande

Kvankam oni esperas ke kiel eble plej multe da JEN-anoj iros al la portlanda kongreso ĉi-somere, eblas ke por kelkaj Eŭropo pli forte allogos, aŭ ke eĉ nun ili deziras plani la venontan someron. Por helpi tiujn, kiuj pripensas vojaĝon al Eŭropo, jen informo pri somera studado tie.

Estas tri bazaj specoj da studvojaĝo:

(1) Someraj programoj starigitaj de fremdaj universitatoj. Ĝenerale tiuj ĉi programoj estas relative malmultekostaj kaj ofertas pli da okazoj renkonti personojn kiuj ne parolas la anglan (por praktiki aliajn lingvojn . . . aŭ instrui al ili Esperanton!).

Usona studento kiu deziras partopreni programon starigitan de fremda universitato devas aranĝi sian propran transporton, sed tio kelkfoje povas esti avantaĝo; oni tiel povas vojaĝi pli libere en Eŭrope antaŭ aŭ post la program-periodo.

Tiuj kiuj deziras akiri studkrediton pro partoprenado en programoj starigitaj en aliaj landoj spertos multajn malfacilaĵojn. Se ne gravas al vi uzi la studkrediton en usona universitato, tia vojaĝo donas bonan okazon malstreĉiĝi kaj ĝui.

Por ricevi liston de programoj starigitaj de alilandaj universitatoj, sendu usonajn $2.00 al Institute of International Education, 809 United Nations Plaza, New York, NY 10017, Usono.

(2) Someraj programoj starigitaj de usonaj universitatoj kaj gimnazioj. Tiuj programoj inkluzivas transporton, loĝadon, instrukoston, kaj direktadon. La studentoj en tiuj ĉi grupoj estas preskaŭ ĉiuj usonanoj, kaj oni pli facile aranĝas ricevi studkreditojn.

(3) Someraj student-programoj starigitaj de privataj organizaĵoj. Elektu zorge kaj singarde! Kelkaj programoj estas tre bonaj, aliaj estas nekontentigaj. Du organizaĵoj kiuj starigas bonkvalitajn programojn estas la American Institute for Foreign Study, 102 Greenwich Avenue, Greenwich, Connecticut 06830, kaj la Foreign Study League, 163 East 3900 South, Salt Lake City, Utah 84107.

Utila libro por studantoj estas la 450-paĝa <u>The New Guide to Study Abroad</u> (La Nova Gvidilo al Alilanda Studado), eldonita de Harper and Row. Ĝia prezo estas usonaj $2.95.

## "Unu giganta salto por la homaro . . ."

Estas vere malfacile por mi akcepti kritikantojn de la kosmoprogramo. Estas dolore kompreni ke estas homoj kiuj tute volontas lasi la homaron stagni en sia planeda orfiŝbovlo, kiuj pensas ke la pligrandigo de scio kaj la plenumigo de la homa spirito estas blago, kaj kiuj opinias ke ia ajn enterpreno estas malŝparo de mono se ne estas tute personaj beneficoj.

Mi scias ke homoj ekzistos ĉiam, kiuj ne subtenas pacan rimedon unuigi la homaron kaj direkti agresecon, kiuj kondamnas ion kio ŝajnas perfortita kaj pri kio ili scias nenion, kiuj ne havas proteston kontraŭ la bilionoj elspezitaj por milito kaj korupcio, sed atakas la jam minimuman buĝeton de unu el la plej gravaj kaj signifaj programoj de la homaro.

Estas pro ĉi tiaj homoj ke la homaro eniras la mallumajn epokojn.

Craig C. Koukol



## Mezuro pro mezuro

de John L. Dahnke

La titolo de la teatraĵo de Ŝekspiro prezentas la fakton ke ĉiuj el niaj vizitantoj dum la UK ĉi-jare uzos la metran sistemon. Jes, eĉ la britoj ŝanĝas! Kaj niaj ĵurnaloj kaj gazetoj prognozas ke dum la venontaj dek jaroj, Usono ŝanĝos ankaŭ. Ĉu ni estas pretaj? Ni studas la internacian lingvon, kiun uzas eble ok milionoj. Ni lernu la metran sistemon, kiun uzas preskaŭ ĉiuj! Hazarde, iujn mezurojn oni lernas facile.

Pri distanco, oni memoru ke unu metro egalas proksimume tri futojn. Do, Monto Hood havas 3.426,48 metrojn. Rimarku ke la punkto kuŝas kie ni uzas la komon, kaj la komo kie ni uzas la punkton. La kilometro egalas 5/8 mejlo. Do, la Rivero Mississippi estas longa ĝis 4.119 kilometroj. Fine, la colo havas 2,5 centimetrojn.

Pri areo, oni memoru nur ke la hektaro egalas 2,5 akreoj. Por aŭtomobila fako, oni lernu ke la litro egalas proksimume du pajntoj. Kvar literoj egalas galono. Unu galono da benzino kostas proksimume 50 cendojn en Eŭropo.

Pri pezo, oni memoru ke kilogramo egalas 2,2 funtoj. La unco egalas 30 gramoj, kaj la metra tuno egalas la "longa" tuno-- 2.000 funtoj. Por la fraŭlinoj, la karato de diamanto egalas 200 miligramoj. La kalerio estas la sama kiel en Usono kaj restas en la samaj lokoj surkorpe.

Pri tempo, estas interese ke metraj landoj uzas la dudekkvarhora sistemo, laŭ kiu, ekzemple, 2:00 ptm esprimiĝas 14:00.

Usonaj geflegistoj kaj gescientistoj jam mezuras temperaturon centigrade. Akvo bolas je 100°C kaj frostiĝas je 0°C. La ĉambro restas je proksimume 25°C kaj la homa interno preferas 37°C. Oni moderne nomas la "centigradan" sistemon celsiusa.

Memoru ke multaj vizitantoj al Usono bezonas helpon rilate al nia mezur-sistemo. Aparte menciinda problemo estas tiu de vestmezuro. Ĉiu lando havas la propran, kaj ĉiuj vizitantoj, eĉ britoj, konfuziĝos tiu-rilate.

(S-ro Dahnke preparis utilan unu-paĝan gvidilon al la metra sistemo por esperantistoj. Li volonte sendos ĝin al vi kontraŭ unu poŝtmarko je valoro de ok usonaj cendoj. Lia adreso estas 16025 SE McLoughlin, Portland, OR 97222, Usono.)



## Grava ekspozicio

Tiuj, kiuj interesiĝas pri arkeologio, arto, metioj, historio, aŭ fremdaj kulturoj (do, ĉiuj E-istoj, ĉu ne?) nepre penu ĉeesti la vere mirindan ekspozicion el Sovetunio kiu trairas Usonon ĉi-jare.

La plej malnovaj ekspozicieroj estas el la tria jarmilo antaŭ Kristo, kaj similas je la praartfaraĵoj de aliaj kulturoj--simplaj riprezentaĵoj de homoj kaj bestoj.

Sed tuj poste la nivelo de la artaĵoj pliklereciĝas, kaj oni vere miras je la alta nivelo de la malnovaj kulturoj kies teretorion nun enhavas Sovetunio.

Estus maleble vere priskribi la ekspozicion kontentige, sed aparte menciindas la brodaĵoj kaj oraĵoj inter la historiaj ekspozicieroj, kaj inter la modernaj eroj, la mirindaj kroĉetaĵoj, vitraĵoj, baltrespublikaj tapisoj, kaj ĉarmaj fajencaĵoj.

Troviĝas ĉe ĉi tiu ekspozicio kompate malmulte da "socia-realisma" influo. Pri la modernaj metiistoj kies metiaĵoj oni vidas tie, oni sentas ke la plej altrangaj influoj estas amo de kaj scio pri la materialoj, kaj pri la kreaj eblecoj kiuj naskas el interrilato de homo kaj materialo. La plej oftaj temoj estas folkloraj kaj naturaj.

La ekspozicio travojaĝas Usonon kiel parto de la usona-sovetunia programo de kultura interŝanĝo. Kiel interŝanĝekspozicio, Usono sendis al Sovetunio ekzemplaron de usona teknologio, precipe rilate al kiel ĝi rilatas al ĉiutaga vivo kaj homoj. Do, ni ekspozicias aŭtomobilojn, "princess"-telefonojn, ktp.

Restas al la sovetunia ekspozicio kelkaj monatoj en Usono. La plano jenas:

Minnesota Museum of Art
Minneapolis/Saint Paul, Minnesota
26 aprilo ĝis 23 majo

Field Museum of Natural History
Ĉikago, Illinois
16 junio ĝis 13 julio

Boston Museum of Fine Arts
Bostono, Massachusetts
6 aŭgusto ĝis 2 septembro

Metropolitan Museum of Art
Novjorkurbo, Novjorko
26 septembro ĝis 23 oktobro

Kelkaj notoj ne pri arto--Almenaŭ en la ekspozicio en Losanĝelo, estis oficialaj interpretistoj de la rusa kaj la angla. Ankaŭ estis kelkaj riprezentantoj (tute neoficialaj!) de grupo de ukrajnaj enmigrintoj kiuj protestis la subpremadon de ukrajna intelekta vivo fare de la sovetunia registaro.

Ankaŭ deziras korespondamikojn:

S-ro Nzemba Yi Paku-Nkiama
Direktoro de Centra Disvastiĝo
de Esperanto en Afriko
B. P. 380
Kinshasa/Limete
Respubliko de Zejro--République
de Zaire

F-ino Pholo Suzanne
B. P. 505
Kinshasa/Limete
Respubliko de Zejro--République
de Zaire

21-jara studentino en supera lernejo, en sektoro de la angla lingvo. Deziras korespondi esperantlingve kaj anglalingve. (B. N.: Resp. de Zejro anstataŭ Resp. de Kongo.)

Margarita Pereira Felipe
Rua Belo Monte 561
Rocas, Natal, R. N.
Brazilo

10-jara knabino.

(daŭrigita sur paĝo 10)

# ENIGMO POR VOJAĜANTOJ

Laŭ la indikoj, trovu la ĝustajn vortojn kaj skribu ilin laŭ la malplenaj linioj kiuj havas la samajn numerojn. Skribu unu literon por ĉiu substreketo aŭ kvadrato. Kiam vi finos, vi trovos la solvon (kiu fakte estas demando!) literumita en la kvadratoj.

<u>Indikoj</u> (ĉiuj estas transportiloj)

1. Ĝi povas surterigi sur konstruaĵ-supraĵoj.
2. Tiu ĉi transportilo kaŭzas multe da fumnebulo.
3. En tio ĉi vi eble trovos ke okazas subita ŝanĝo de la vojaĝoplanoj de ĉiuj.
4. Uzita de personoj kiuj loĝas en la antaŭurboj de kelkaj urbegoj.
5. La persono kiu posedas tiun ĉi transportilon devas ankaŭ posedi fortan kudrilon.
6. Por malrapida, malstreĉiga vojaĝo.
7. Ĝenerale por unu persono, kelkfoje por du.
8. Kvar radoj por ĉiu piedo.
9. Taŭgas por interplaneda vojaĝado.
10. Specialaĵo de malvarmaj landoj.

1. h e l i [k] o p t e r o
2. l o k o m o t [i] v o
3. a [e] r o p l a n o
4. t r a m [o] j
**
5. [v] e l b o a t o
6. d i l i ĝ e [n] c o — elefanto
**
7. m o t [o] c i k l o
8. [r] u l ŝ u o j
9. r a k e t [o]
10. [s] l e d o

?

Carlos Alberto Cacho Ribeiro
Montano Empericiano 1261
Tirol, Natal R. N.
Brazilo
17-jara fraŭlo.

Emilia Pienowska
Gdansk-Oliva
ul. Polanki 64, D55
Pollando
Ŝi studas geografion por fariĝi instruistino. Interesiĝas pri belletro, filmo, sporto, turismo, vojaĝado, bildkartoj, usona vivo kaj kulturo.

Haraszti Magdalena
Heicu Pal ut. 21c
Pec
Hungarujo
edziniĝita junulino.

Barbara Jarguz
Mystowice
ul. Wyspianskiego 14/9
Pollando
16-jara fraŭlino.

* * * * * * *

TEJO en Portlando

La provizora TEJO-programo por Portlando ŝajnas interesopika. Titolo: Ĉu la moderna vivo polucias la menson? Detaloj sekvos.

Pri la enhavo de artikoloj respondecas nur la verkintoj. Nesubskribitajn artikolojn verkis la redakcio de JEN-Bulteno.

Redakcio, JEN-Bulteno
ĉe Erik J. Felker
731 Birmingham Road
Burbank, CA 91504
Usono -- U. S. A.

MAY 13'72

NDALE MAY 11 PM 1972 ALIF




first class

[redacted]

POSTAGE DUE 8 CENTS

address correction requested